
# H

## *Wilhelm HAASE-MEISTER*
*1885-1969*
## *Clara HAASE-MEISTER*
*1882-1968*



Wilhlem Haase kaj Klara Haase-Meister
en 1914 kaj 1964 (supre)





Wilhelm H. laboris kiel drogisto en Breslau, Berlin, Duisburg, Burgdorf/BE (de 1909), Olten/SO (de 1914) kaj Chur/GR (de 1931).
Li lernis Eon, leginte artikolojn pri Eo en la germana junulara revuo *Der gute Kamerad* (1905/06) kaj pro intimiĝo kun la *Fundamenta Krestomatio.* Post sia translokiĝo de Germanio al Svislando kaj instigita de prelegoj de ➝Friedrich Uhlmann kaj ➝Jakob Schmid, H. kunfondis (kaj administris) la EG en Burgdorf/BE (1909), aliĝis al SES kaj kunlaboris kun la najbara EG en Hasle-Rüegsau/BE, kie li konatiĝis kun sia posta edzino *Clara Meister* (1882-1968), kiu ankaŭ estis fidela e-istino. H. partoprenis la 9an UK (Berno 1913) kaj multajn lokajn aranĝojn. Li estis Eo-kursestro en Burgdorf kaj Olten (inter 1910 kaj 1930), ankaŭ kunfondinto kaj sekretario de la EG en Olten (1923), UEA-delegito kaj Eo-stenografo. En Chur/GR, kie li vivis kaj laboris ekde 1931, li evoluigis la Eo-kurson *Eo in fünf Lehrbriefen* por la privata uzado en malgranda lernorondo.
➝Berno ➝Grizono ➝Soloturno

## *Rudi HAUGER*
**1930. Loĝas en Niederglatt ZH*



Germano, diplomita kemiisto (universitato de Saarbrücken/D). Post kelkjara industria agado en Italio, Svislando kaj Germanio, de 1967 li fariĝis scienca kunlaboranto kaj supera asistanto ĉe la laboratorio por solidstata fiziko de la svisa politeknika altlernejo (ETH) en Hönggerberg/Zuriko. Tie li okupiĝis i.a. pri la kreskigo de artefaritaj kristaloj por sciencaj kaj teknikaj esploroj.
H. estas internacie konata e-isto kiel regula preleginto dum la internaciaj kongresaj universitatoj kadre de la UK. Li estis sekretario-kasisto de ISAE, kiu verkis legindajn artikolojn en *Internacia Scienca Revuo,* kiun li multajn jarojn mem redaktis aŭ administris (en la jaro 2000 lia aktiveco ĉesis). En primovada kontribuaĵo el la jaro 1992 H. kritikis la (et-)burĝan socion, en kiu Eo grandparte estas disvastigata kaj kiu ne kapablas aŭ ne ŝajnas interesiĝi pri pli granda internacieco de Eo. Laŭ li estas strange, ke tia praktika kaj inteligenta ideo de neŭtrala universala lingvo

ne povas havi pli da signifo kaj influo; la respondecon H. ŝovis al la anoj de la Eo-komunumo mem, kiuj ne kapablus produkti pli profesiecajn servojn, sed anstataŭ tio limiĝus al bagatelaĵoj bedaŭrinde ofte fuŝaj.
→Antologio

## *Hans HERRMANN*

*1926-2002*



Eon la denaska turgoviano kaj diplomita librobindisto lernis ekde 1942 per la koresponda kurso de SES. En la 1940aj jaroj li estis IEL-delegito. Movade plej aktiva li estis inter 1950 kaj 1980: kiel membro (ekde 1946) kaj prezidanto (1953-54) de SES, kiel ano de la berna EG kaj de UEA, kies fakdelegito pri magio li estis. En 1950 li fondis la ES en sia tiama loĝloko Zug. Kompreninte la danĝeron de la maljuniĝo de SES, en 1951 li starigis, kun →Bruno Graf, la junularsekcion de SES, kies vicprezidanto li fariĝis (nomita kiel honora membro en 1956). Ekipita kun la supera ekzameno (1951) de SES H. gvidis diversajn Eo-kursojn en Laŭzano (kie li fondis etan Eo-ĉelon por la junularo), Zug kaj Berno. En esperantujo H. iĝis konata kaj ŝatata ankaŭ kiel magiisto kun la nomo Hoho. Ĝis sia morto H. loĝis en Münchenbuchsee/BE.
→Berno →Junularo →Svisa Esperanto-Societo

## *Hector HODLER*

*1887-1920*





H. estis elstara kaj grava svisa Eo-pioniro, organizanto, publicisto, ĵurnalisto kaj verkisto, kunfondinto de UEA en Ĝenevo, posedinto kaj redaktoro de la revuo *Esperanto* en ties unua periodo. Krome li estas memorinda kiel la filo de la mondfama berna pentristo Ferdinand H. (1853-1918). Kiel Stettler raportis H. eĉ mem pentris kun sufiĉa lerteco, sed li fosis sian propran sulkon. Forlasinte anticipe la ĝenevan liceon, H. decidis dediĉi sian tutan energion al la Eo-movado. Eon li lernis en 1903 samtempe kun →Edmond Privat kaj Paul Bouvier, liaj lernejaj kamaradoj. En 1903 la amikoj, kiuj estis en kontakto kun la eminenta filozofo →Ernest Naville (1816-1909), fondis la *Klubon de Junaj E-istoj de Ĝenevo* kaj la revueton *Juna E-isto* (kiu aperis ĝis 1909) kaj komencis administri la Eo-agadon. De siaj samtempanoj H. estis priskribita kiel modela idealisto, al kiu tamen ne mankis praktika sento.



La junulo Hector Hodler en 1900 kaj 1908

Li cerbumis senĉese kiel fari Eon praktike uzebla kaj opiniis, ke oni ne devas apartigi la planlingvan movadon de la makrosocio; antaŭvideble Eo kreskos per si mem, eĉ sen iuj specialaj organizoj. Privat skribis pri li jenon: „Al tio, kion iniciatis la genio de Zamenhof sur la kampo lingva, H. aldonis la necesan bazon sur la kampo socia.“ (vd. *EdEo*).



La gepatroj de Hector Hodler: Ferdinand Hodler (1853-1918) kaj Augustine Dupin (supre, ĉ. 1884, +1909, artmuzeo en Berno; sube Dupin en 1885, Hodler en 1890)



Alia kamarado de H. estis →Eduard Stettler, kiu rolis kiel UEA-vicdirektoro, direktoro kaj fine prezidanto de la asocio kaj akompanis la laboron de H. En sia monografieto *Hector Hodler. Lia vivo kaj lia verko* (UEA 1908-28), Stettler skribis jenan karakterizon pri sia kolego H.: „En 1887, kiam la pentristo H. staris meze en la malfacilaĵoj de la vivo, baraktante pri arto kaj ekzistoeblecoj, naskiĝis la 1-an de Oktobro lia filo, Hector, Ferdinand. La patrino, nask. Augustine Dupin, estis Ĝenevanino. La malgranda familio loĝis ie ajn en modesta kvartalo, pliposte okazis malinterkonsentoj inter la gepatroj. Pli multe mi ne scias; la silenta H., kaj tio estas forta trajto de lia karaktero, neniam parolis pri siaj intimaj aferoj nek esploris tiujn de la aliaj. Eĉ kiam mortis lia patrino, 1910, li diris preskaŭ nenion, sed ni ĉiuj en la oficejo, vidante tiun viran junulon, kiel li trapasis la ĉambron, la larmojn en la okuloj, kie li laboregis por forgesigi la akran doloron, ni sentis la tutan forton de l’amo lin liganta al la kara patrino. En ŝi li perdis la malmultan lumon de sia juneco. Liajn knabajn jarojn priskribis S-ro Edm. Privat en Eo, tiel bone, ke mi permesas al mi represi la koncernan parton: «Kiam mi dekdujare eniris gimnazion», diras S-ro Privat, «mi tuj rimarkis tiun novan kamaradon, altan, malgrasan, malriĉan, kun mirindaj okuloj, kaj senordaj brunaj haroj kronantaj lian belan grekan frunton. Lia neforgesebla figuro aperis sur pli ol unu pentraĵo de l’patro. Kiam ni kune elkuris el klaso je la kvara posttagmeze, Hector H. malgaje rapidis al la patra pentrejo sub tegmento por sidadi aŭ staradi terure senmove dum horoj kiel modelo. Dum tiu turmento li kutimiĝis je pensado. Tiam li lernis tiun silentemon kaj trankvilecon, kiuj kaŝis sub iom nevarma eksteraĵo la plej senteman koron kaj fervoran animon. Kiam la patro ne bezonis lin, ni faris kune longajn promenadojn, diskutante kiel knabetoj pri la profundaj misteroj de l’socia vivo. Li estis la pli saĝa kaj la pli multscia. Dekdujare li jam legis tutan Zola!»“



Hector Hodler en 1917 kaj kiel bebo

Pri la e-istiĝo de H. Privat rakontis ĉe Stettler jenon: «Unu tagon en 1903 mi alportis en klason esperantan gramatikon. 'Ankaŭ mi jam eklernis la lingvon', li respondis kun brilo en la okuloj. Post tri semajnoj ni jam flue interparolis en la nova lingvo kaj decidis fondi klubon kaj ĵurnaleton: *Juna E-isto.* Unu post unu vendiĝis niaj belaj premilibroj aŭ volumoj de Jules Verne por pagi la eldonelspezojn. La redakcio sidis dum kvin jaroj sur la sama benko en la fundo de klaso. Dum kiom da lecionoj pri matematiko ni gluis poŝtmarkojn, skribis adresojn aŭ legadis patrajn leterojn de profesoro Cart aŭ D-ro Zamenhof!

H. jam montris ŝaton je ordo kaj serioza organizo. Ankaŭ li vidigis senpartian ekvilibron. Laŭ lia instigo ni lernis kune 'Idiom Neutral' kaj 'Bolak', por certiĝi, ke Esperanto estas ja vere la plej taŭga lingvo internacia. La organizo de la Dua Kongreso (Ĝenevo 1906) alportis novajn spertojn. H. speciale interesiĝis je la proponoj de S-roj Rousseau kaj Carles pri e-istaj konsuloj. Li insistis pri tio, ke nia movado devas stariĝi sur fundamento samtempe pli idealista kaj pli praktika, organizante reciprokan sinhelpadon inter bonvolaj homoj. Igi la lingvon tuj utila kaj prepari internacian tuthomaran popolon, jen la temo, kiun pristudis lia pensema inteligento. En 1907 la gazeton Esperanto li reprenis el la manoj de Paul Berthelot kaj redaktis ĝin laŭ tiu tendenco 13 jarojn ĝis sia morto, krom ses monatojn en 1914 dum la unua mondmilito.» (→Universala Eo-Asocio)

Kiam dum la 2a UK (Ĝenevo 1906), kie H. brile paroladis, la francaj e-istoj Théophile Rousseau kaj Alphonse Carles proponis la reton de Eo-konsuloj kiel movadan organizan sistemon, H. montris sin tre interesata kaj tuj eklaboris por la efektiviĝo de tiu projekto, en kiu li vidis realigebla sian planon, nome organizi reciprokan helpon inter bonvolaj homoj diverslandaj - jen la idea ĝermo de la baldaŭ fondota UEA.


Kiam →René de Saussure (1868-1943) malfermis kaj direktis e-istan propagandan kaj sciencan oficejon en Ĝenevo (strato Bovy-Lysberg 8), kie estis redaktata kaj administrata *Internacia Scienca Revuo*, H. fariĝis lia salajrita helpanto. Kiel Stettler menciis, en 1907 H. mem transprenis la redaktadon de la revuo *Esperanto* el la manoj de ĝia fondinto kaj redaktoro Paul Berthelot (1882-1910), fariĝante ĝia posedanto kaj redaktoro. La 12an de februaro 1907 H. publikigis sian unuan numeron. Li volis redakti la gazeton por la tutmonda e-istaro, kaj vere *Esperanto* baldaŭ fariĝis la centra organo de la Eo-movado. Li aperigis la gazeton pli ol 13 jarojn regule (escepte de ses monatoj en 1914), verkis por ĝi multajn gravajn kaj signifajn artikolojn (dum la milito antaŭ ĉio pri la problemoj de milito kaj paco), kutime signitajn per A.R., iom tradukis kaj sugestis traduki ĉefverkojn anstataŭ bagateloj. Tiel H. fariĝis konata kaj respektata ne nur pere de legindaj artikoloj en la revuoj *Juna E-isto, Esperanto, Tra la Mondo, L'Espérantiste,* sed ankaŭ pro la traduko de kelkaj beletraĵoj kiel *Paŭlo kaj Virginio* (Paul et Virginie) de J.H. Bernardin de Saint-Pierre (1905), *Legendo de S. Juliano* de G. Flaubert (1907), *Sabla homo* de E.T.A. Hoffmann (1907), *Moralaj kaŭzoj de la militoj* de N. Angell (1913), *Amerikaj pejzaĝoj kaj urboj* de C. Lesca (1913).

Intertempe la proponoj de Rousseau kaj Carles pri la konsuloj koincidis kun la hodleraj planoj; ili estis traktataj en lia gazeto kaj fakte trovis varman akcepton ĉe la legantoj. Okaze de la 3a UK en 1907 ekzistis jam proksimume 200 konsuloj, kaj UEA povis esti fondita de H. kaj Théophile Rousseau fine de aprilo 1908 en Ĝenevo kiel „fortika ligilo de la solidareco inter diverslingvanoj".

Sekve H. fariĝis la unua (ĝenerala) direktoro kaj vicprezidanto de UEA kaj redaktoro de *Oficiala Bulteno de UEA* (kunlabore kun la sekretario →Hans Jakob). Dum la unua mondmilito H. organizis kun sia kolego Jakob la helpservon de UEA favore al malaperintaj e-istoj en la militaj landoj kaj komencis skizi siajn imagojn pri la nova socio en mondo pli paca kaj pli demokratia. En UEA H. vidis la modelon por la internacia solidareco, kiu estis praktikata dum la milito. Antaŭvidante kolektivismajn tendencojn kaj la pliakriĝon de la klasbatalo, H. vidis en la e-istaro „la embrion de tiuj elitoj", kiuj super la naciaj ruinoj konstruu novan, internacian domon.

H. kelkfoje estis forlasita de la kuraĝo kaj li montris ankaŭ dubojn. Precipe li direktis

akran, preskaŭ sarkasman kritikon al tiuj movadaj gvidantoj, kiuj mem dubis pri la sukceso de la nova organizo UEA.



Memportreto de Hector Hodler


Fine de sia mallonga vivo – li malsaniĝis en 1912 pro familia malsano (la pulmmalsano aŭ tuberkulozo) kaj mortis en Leysin/VD – H. turnis sin ĉefe al sciencaj okupoj, inkluzive de lingvaj demandoj. En 1916 li skribis 387-paĝan franclingvan verkon pri la paca organizado de la popoloj. Al UEA H., respektive lia vidvino *Emilie H.-Ruch* (1880-1964), kiu post longdaŭra gefianĉiĝo edziniĝis kun H. en 1918, postlasis grandan parton de la posedo kun la celo laŭeble certigi la ekziston de tiu organizo. En 1920 la komitato de UEA nomis ŝin honora membro.
En siaj rememoroj (publikigitaj sub la titolo *Servisto de l'ideo. 50 jaroj ĉe Universala Esperanto-Asocio 1908-1958,* Antwerpen 1995, p. 13), Hans Jakob raportis pri la personeco de H. jene: „H. (...) unuigis en si artiston kaj homon praktikan. Li estis altkreska, kun nigra barbo,... kun aspekto serioza, malofte ridanta, kelkfoje sarkasma, precizema kaj tolerema. Liaj specifaj kvalitoj estis tiuj de ĵurnalisto: li posedis la talenton prezenti komplikajn problemojn en komprenebla maniero. (…) Netrudeme li sciis estri la stabon de la tiama Centra Oficejo [de UEA] per propra ekzemplo. Progresema, li ne kateniĝis en iu doktrino, sed serĉis kompreni la kontraŭulojn. Li estis firma kaj principema kontraŭ la reformismo lanĉita de la Delegacio por alpreno de internacia helplingvo (Ido)."
Same severa li kondutis en la kazo de René de Saussure, kiam ĉi tiu komencis publikigi siajn reformproponojn por laŭdire plibonigi Eon; H. reagis negative, per akra kritiko kaj publika primokado, ĉar li opiniis, ke la agado de lia eksa subtenanto estas danĝera por la Eo-movado.


U.E.A.
Esperantia Biblioteko.
H. HODLER
Der Esperantismus
:: Der internationale Verkehr ::
Esperantismus und Esperanto
Die Universala Esperanto-Asocio
Grundriss der Esperanto-Sprache
Preis: 20 Pfennig
Universala Esperantia Librejo
: Börsenstrasse 10, Genf (Schweiz) :

*La esperantismo* – programo de Hodler por la mondo


Multon pri la karaktero de H. konfirmis Stettler en sia libro: „Okaze de la morto de H., la [berna] presejstro [de la revuo *Esperanto*] funebris kun ni dirante: «Mi vidis lin nur unu fojon, sed malmultajn homojn mi lernis altestimi kiel lin. Unu post la alia niaj naciaj kaj internaciaj bultenoj malaperis dum la milito, sed ĉiam alvenis la manuskriptoj por Eo, en ordo malofta, konscience korektitaj per tiu manskribo firma kaj bela, kiu neniel

divenigis lian malsanon. Devis esti homo je energio kaj konscienco eksterordinaraj.»“
Pri tiu energio Stettler daŭrigis rakonti aliloke en sia libro jene: „En H. ĉio koncentriĝis en lia laboro, utili, for de la homoj, al la homaro. Neniam lerninte la agrablan arton de ‘konversacio’, li restis eble plej malproksime de ĉio, kio nomiĝas salono, invito aŭ festo. Multaj vizitantoj de l’oficejo tial ne havis de li la veran impreson, kelkaj nur tiun, ke la Direktoro forestas. Intertempe H. estis forkurinta en sian ĉambron aŭ en kafejon, tie ellaborante artikolon, kiun, revenante, li gaje eltiris el unu el la sennombraj poŝoj de sia surtuto, ĉiam ŝarĝata je papero kiel rondiranta librejo. Aliaj, dum ili parolis pri la bela vetero, sentis, ke liaj ideoj estis tute alilokaj, aŭ rimarkis kun malkontento la foreston de formoj aŭ titoloj, je kiuj kredis sin rajtigitaj. Kiu lin konis aŭ sciis trafi en la celon de la pensoj lin okupintaj, tiu forlasis la ĉambron, riĉigita per novaj ideoj. Iom simile estis kun H. kiel paroladisto; ne mankis al li facila esprimkapablo, sed pro la multeco de ideoj aŭ la komplikeco de la formo lia parolado similis al artikolo, sekve ne kaptis sufiĉe rapide – aŭ li ekscitiĝis, tiel pli malkontentigante ol konvinkante la kontraŭulojn. Tial li kaj Bolingbroke Mudie, tiu naskita prezidanto, bonege kompletigis unu la alian.“ Post la forpaso de Bolingbroke Mudie en 1916 H. mem estis elektita kiel prezidanto de UEA en 1919; ĉi tiun oficon li tamen ne longe okupis, ĉar li mem mortis en 1920.



Jakob Schmid, Hector Hodler, René de Saussure kaj Edmond Privat en Soloturno (1909)

Pri la hereditaj trajtoj de H. Stettler notis: „Sian laboremon kaj ekkolereman temperamenton H. havis de la patro, supozeble ankaŭ el la patra gento herediĝis la terura tuberkulozo, tiom disvastigita en nia lando. De la patrino devenis la natura delikateco, kvazaŭ neinstruita bonedukiteco, kiu kontrastis kun lia pli ol simpla, okaze nezorgita eksteraĵo. Dum sia malfeliĉa juneco li lernis suferi, observi, silentante. En la 11 volumoj de nia korespondado, troviĝas simplaj aludoj je operacioj kaj senkulpigoj, kial li ne povis labori, sed neniu plendo, neniu riproĉo. (…)“




Hector Hodler – laŭ desegno de Jean Robert, 1912

„Oni ne rajtus diri, ke li estis melankolia; li vivis en tiu gaja seriozeco, observebla ĉe forte laborantaj personoj, rilatante kun la mondo pli per siaj ideoj ol per sia persono. Ofte li faris bonegajn spritaĵojn; okaze li kore ridis, neniam mi vidis lin legi kun plezuro amuzajn ĵurnalojn. Mankis al li la facilanima spirito. Prenu ordinaran komercvojaĝiston, belvestitan, grasan, kiu ridigas tutan societon, aŭ ĉe botelo da vino klarigas, kiel Dio estus

devinta krei la mondon, kiu ĉion povas, scias kaj ĉion vidis, - poste returnu tiun personon en sian malon de komenco al fino, kaj vi havos H. Liaj kapabloj estis ĉefe tiuj de eminenta ĵurnalisto: rapida kompreno de gvidantaj ideoj, facileco je klara aranĝo kaj skriba esprimo, enviinda kapablo ĉiam esti ĝustatempa. Ne sklavo aŭ eĉ nur servisto de bonordo, li vivis kun la kalendaro en la kapo. (…) Kun la respekto, kiun influis lia supera inteligento kaj laboremo, estas lia reguleco, kiu starigis lian altan aŭtoritaton en la oficejo. Tro timema por estri, - la agrablan taskon maldungi oficistojn aŭ forpeli altrudemajn vizitantojn li prefere donis al mi, - sen intereso por la mastrumaj bezonoj de la ĉiutaga vivo, li estis la mastro de ĉio, per la forto de sia karaktero. Pripensema, li turnis kaj returnis la aron de siaj ideoj por trovi la ĝustan solvon. (…) Same belaj estis liaj koleroj.“



Kaj Stettler estis konvinkita, ke „je la fino de sia mallonga vivo H. estus povinta taŭge plenumi oficon de privat-docento por siaj aferoj“, ĉar „ne nur li inteligente legis, amason da gazetoj kaj revuoj, sed kiel abonanto al diversaj bibliotekoj li trastudis multajn volumojn pri historio, ŝtataj aferoj, socia agado, psikologio ktp.“

La meritojn de H. Stettler do povis resumi per jenaj frazoj: „Mi ne kredas trograndigi dirante, ke la merito de H. konsistis en tio, ke li sciis kunigi sub unu tegmento la diversajn proponojn kaj provojn de praktika agado; ke per siaj belaj artikoloj li vekis la energion de la e-istoj; kaj ke li donis al tiu nova organizo altan celon: „Krei fortikan ligilon de solidareco inter diverslingvanoj.“ Malgraŭ amaso da malfacilaĵoj, kiujn H. alfrontis en sia vivo, Stettler, kiu ankaŭ dediĉis plurajn paĝojn al la tempo de la malsano de lia legendeca kolego, konkludis: „Malgraŭ ĉio, lia vivo estis feliĉa. El la rilatoj kun malmultaj intimaj amikoj, el la simpatioj de miloj de samideanoj, kiuj aliĝis al UEA, H. ĉiam ĉerpis novajn fortojn. Por ke sukcesu la movado, li modeste laboris kvazaŭ oficisto, ne malŝatante okupojn malindajn je liaj kapabloj.“
El alia ero de la libro de Stetter ni scias, ke H. interesiĝis pri bestprotektado: „En urbo tiel asociema kiel Ĝenevo, H. aniĝis unu solan lokan societon, tiun por la protekto de la bestoj, kaj iam diris, ke li ŝatus fari el UEA asocion por protekti la homojn. Malfeliĉe oni ne povis lin decidigi, ke li partoprenu iun sporton, ludon, aŭ forlasu siajn okupojn, la longan tempon necesan por serioza kuracado. Kelkajn koncertojn li vizitis, malofte la teatron.“
Ekde 1980 la biblioteko de UEA en la roterdama CO nomiĝas Biblioteko Hector Hodler.



Edzino Emilie Hodler-Ruch, honora membro de UEA (fotis Fred Boissonnas, 1915)

Sen la familia situacio de H., kiu estis tre malfacila, lia vivo ne estas plene komprenebla. La patrino de H., Augustine Dupin (1852-1901), modesta tajlorino-kudristino, servistino kaj lavistino, ne estis la edzino, sed unu el la sinsekvaj modeloj kaj amatinoj de la pentristo (ekz. *Kuraĝa virino*, 1886). Ŝi originis el Savojo, kaj Ferdinand H. konatiĝis kun ŝi en 1884 en Ĝenevo. Ekkoninte la artistan majstrecon de Ferdinand, Dupin preferis ne geedziĝi, sed esti por li fidela kunulino sen ŝarĝo. Por pergajni la vivon la pentranta patro ŝatis uzadi la evidente tre amatan knabeton kiel model-pozanton. Tial en iu periodo de la verkaro de Ferdinand H. abundas la desegnoj kaj pentraĵoj, kiuj montras unue la suĉinfanon, poste la junuleton.



Pentraĵoj de Ferdinand Hodler: Ensorĉita knabo (1894, artgalerio de Zuriko); La Elektito (1893-94, artgalerio de Berno); Regard dans l'infini (1903-1906). La knabo estas Hector Hodler.

*Priskribo de kelkaj verkoj de Ferdinand H.:* En la jaro 1893 la sesjarulo fariĝis modelo por la pentraĵo *La ensorĉita knabo.* Ekde la aĝo de sep jaroj H. estis modelo por serio da pentraĵoj de la patro: *La printempo* (1901), *Vido en senfinon* (1903-06) kaj *Junulo admirata de virino.* H. estis ankaŭ la unua modelo por la oratoro, ĉefa figuro de la *Unuanimeco,* kiu bildigas la strebon al unueco, al kiu havis devosenton kaj la patro kaj la filo. La verkserion rilate Augustine Dupin – depost unu jaro ankaŭ kun H. – pliriĉigis kvar intimistaj kaj sekve varmkoloraj pentraĵoj: *Hector kuŝanta sur planko* (privata kolekto), *Hector sidanta ĉe tablo* (privata kolekto), *Augustine kun Hector sidantaj ĉe tablo*, en kiuj la profilo de la figuroj, simile al Degas, per kontraŭa lumo lokitaj en ombro reliefiĝas antaŭ hela fono; la kvara estis *Augustine kun Hector en la kuirejo* (kolekto Oskar Reinhardt, Winterthur). En ĉi tiuj familiaj pentraĵoj interplektiĝas gajaj orflavaj penikotuŝoj kun malhelaj nigraj kaj brunaj – laŭ la ŝanĝantaj eventoj en la vivo de la figuritoj – interrompitaj de la pasia ruĝo aŭ la delikata bluo de la vestaĵoj. *Adoro* estas desegna antaŭstudo por la *Elektito,* je kiu Ferdinand H. laboris la tutan jaron 1893. En 1901 estis pentrita la *Printempo*. Kiel modelo pozas denove H. La simbolo de la puberteco estas la pentra respondaĵo al la samtempe kreita teatraĵo *Printempa vekiĝo* de Frank Wedekind. Ambaŭ verkoj markas la finon de la viktoriana prudeco (la reĝino Viktoria mortas en la jaro 1901). Aliflanke la ornama bildkonstruo de la *Printempo* korespondas al la stila postulo de la reganta arta kreado en Eŭropo. La pentristo atingis grandan sukceson ankaŭ eksterlande, „ne nur sukceseto“, kiel li akcentis, sin adresante al Miller, kiam li sendis siajn du verkojn la *Printempo* kaj la *Elektito* al la Viena Secesio. La reprezentantoj kaj kritikistoj de la viena secesia stilo komencis, unue ne sen ioma miro, okupiĝi pri la bilda mondo de Ferdinand H., kiu pentris inter la jaroj 1907 kaj 1913 duan version de la *Printempo*, en kiu la peniktuŝoj estas pli malfirmaj, la koloroj pli intensaj kaj la pejzaĝa fono pli stiligita.
Ĉirkaŭ la jaro 1912 kreiĝis ankoraŭ flankinversita versio de la *Printempo* tute en verdaj tonoj, neregule pentrita, kun ellaboritaj partoj karnkoloraj, kiu donas impreson de nefinite-

co. Por la *Junulo admirata de virinoj* la pentristo skribis klarigan komenton, kiu indikas ke la flormotivo ne nur laŭenhave sed ankaŭ laŭ la bildkonstruo estas determina: „Ĉi tie mi provis direkti la intereson dekstren sur la bildo, sur la junulon. La ekvilibro estiĝas per maldekstra, same izolita figuro, kiu apartiĝas ankaŭ laŭkolore. En la mezo troviĝas verde vestitaj virinoj. Kiel por la *Tago,* la *Elektito* kaj la *Vero,* la formoj korespondantaj al la figuroj ordiĝas same kiel floro formas tuton. Bildo estas ja io senmova. Estas forto notenda. En la naturo la figuroj senĉese moviĝas. Mi fiksas ilin en la momento, kiam ili prezentiĝas per la plej agrablaj linioj.“





Pentraĵoj de Ferdinand Hodler:
Supre: Patrino kaj infano (1888, artgalerio de Zuriko); Infano sidanta sur la planko (1889, en privata posedo). La virino estas Augustine Dupin, la patrino de Hector Hodler, kaj la infano estas li mem.
Dekstre: Patrino kaj infano en la kuirejo (1889, fondaĵo O. Reinhard, Winterthur); Patrino kaj infano ĉe la tablo (1889).

Ĉirkaŭ la jaro 1904, do post lia triumfo dum la 19-a ekspozicio de la Viena Secesio, Ferdinand H. pentris la duan version de la *Admirata junulo* kun nur tri anstataŭ kvar ravitaj virinoj kaj la nuda junulo sen branĉoj enmane. Tiuj branĉoj simbolas la paralelan naturordon. Ĉar la edzino de la pentristo, Berthe, kaj lia preferata modelo Jeanne Charles pozas kiel admirantinoj en tiu pentraĵo kaj ĉar lia filo Hector, kun kiu Ferdinand H. sin identigis, reprezentas la admiratan, „harmonion sentantan“ junulon, oni povas supozi, ke en tiu simbolo de vira vanteco revenas la rememoroj pri la belaj vienaninoj kaj ĝenerale postgusto de liaj sukcesoj.








La lastan bildon, kiun Ferdinand H. faris de sia filo, datumas el 1911 aŭ 1912. La patropentristo vizitis la filon regule en la sanatorio de Leysin kaj ankaŭ regule vagadis kun li tra la Valezaj Alpoj, kie ekestis famaj pejzaĝaj pentraĵoj. (teksto de Richard Schneller)
En la faka literaturo la indikoj pri la pentrita filo, ekzemple ke li fariĝis e-isto, estas relative magraj, ĉar la temo estas pli traktata ĉefe el pentroarta kaj pentro-teknika vidpunktoj. Tra Hector H. la fama pentristo mem do eksciis pri Eo, kies ideojn li evidente ne nur aprobis, sed li ankaŭ iel-tiel subtenis la Eo-movadon per sia mono.
→Universala Esperanto-Asocio
→Ĝenevo →Junularo →Ĵurnalismo
→Bibliografio →Antologio

## *Jakob HOHL*
*1911-1994*




Post la gimnazio kaj la porinstruista lernejo H. fariĝis instruisto de la germana, angla, latina kaj itala lingvoj en privata duagrada lernejo en Flims/GR (1934-74). En 1939 li fondis skoltan taĉmenton. 1956-81 li servis kiel paroĥa estrarano. Krome li redaktis kaj eldonis la monatan, germanlingvan gazeton *Für die Stille* (eldonkvanto: 13'000 ekzempleroj).
Kiel e-isto kaj SES-ano de 1936, membro de UEA, KELI (1955) kaj EES (1958), H. faris al la movado kelkajn konkretajn kaj utilajn servojn: ĉ. 1948/49 li gvidis por SES Eo-kurson en Häbernbad/BE, en 1952 li kontribuis artikole en la skolta gazeto *Allzeit Bereit* kaj publikigis en ĝi Eo-kurson. Komence de la ekzisto de KCE li gvidis la korektoservon por ĝiaj Eo-kursoj kaj apartenis al la kontrolantoj de la ekzamenoj en →Kastelo Münchenwiler. Post 1979, pro malsano kaj loĝi-zoliteco, H. praktike perdis la kontakton kun la Eo-movado.
→Grizono

## *Hans HUNKELER*
*1920-2000*




H., kiu vizitis la komercan lernejon en La Neuveville/BE kaj Langenthal/BE, fariĝis komercisto, kiu ekde 1951 laboris kiel trajnestro ĉe la svisaj fervojoj (SFF). Pri Eo H. aŭdis unuafoje en 1939, sed lernis la lingvon nur en 1947 (supera diplomo en 1955). Sekve li dediĉis grandan parton de sia libera tempo al la Eo-movado, precipe sur la kampo de la varbado. Dum multaj jaroj li instruis Eon en la fervojistaj medioj kaj en la komerca lernejo de Aarau, propagandis ĝin inter Bazelo kaj Gottardo, verkis diversajn artikolojn por la sindikataj gazetoj kaj prizorgis la telekurson *Eo per Post* de →Arthur Baur. En 1959 H. iniciatis kaj ĝis 1977 organizis (ekde 1967 kun →Ernst Glättli) entute 18-foje la *Eŭropan Ferian Semajnon* (EFS) en Svislando kaj kadre de ĝi gvidis la mezgradajn Eo-lecionojn. En 1979 li estris kun Glättli la oficialan postkongreson de la 64a UK en Interlaken/BE. Dum la 64a UK (Lucerno 1979) mem li oficis kiel LKK-revizoro.
Pli ol 25 jaroj H. aktivis en SAEF: 1958-66 kiel ĝia vicprezidanto, 1966-73 kiel ĝia prezidanto kaj ankaŭ kiel redaktoro de *Svisa Fervojisto* kaj kiel kunorganizanto de la Internacia Ferio-Semajno sur Herzberg apud Aarau. H., kiu partoprenis multajn Eo-aranĝojn, estis membro de IFEF, ano de SES, dumviva membro kaj iama fakdelegito de

UEA. En 1967, lia daŭra engaĝiĝo estis honorita per la bronza medalo de FISAIC, kaj en 1975 oni festis lin okaze de la jubileo de SAEF en Lucerno. Ankaŭ lia edzino, *Ines H.-Ponzino* (1915-2002), estis e-istino, kaj dum iu periodo ankaŭ iliaj gefiloj scipovis Eon.
→Argovio →Fervojistoj →Svisa Esperanto-Societo